



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

N-ro 27/1974 1 aŭg 1974  
Aperas ĉiusemajne

Ankoraŭ vi havas  
ŝancon akiri "Bonan ŝancon"  
de d-ro Werner Bormann

Prezo 14,40 DM **Edonanto/Herausgeber**  
La libro preskaŭ **Ludwig Pichel**  
estas elĉerpita! **Postfach 2113**  
La lastaj ekzem- **D-85 Nürnberg 1**  
pleroj atendas vin! **Tel. (0911) 46 36 49; 5142 69**

### Solena inaŭguro de la 59a Universala Kongreso de Esperanto

Hamburgo (pp) Pli ol 1600 kongresanoj el kvindeko da landoj kaj ĉ. 200 gastoj kolektiĝis en la salono Zamenhof de la moderna kongresejo Congress Centrum Hamburg dimaŭne, la 28an de julio 1974 je la 10a horo, por malfermi la 59an Universalan Kongreson de Esperanto.

Bonvenigis la kongresanojn la dua, nun aganta urbestro de Hamburgo, prof. d-ro Biallas, kiu samtempe estas senatano pri kulturo. Transdonante la salutojn de la Libera kaj Hansa Urbo Hamburgo, la urbestro atentigis i.a. pri parencaj trajtoj inter la spirito de Hamburgo kaj la idealoj de la Esperanto-movado. Li nomis la "bilancon" de Esperanto kiel rimarkinda, ke ĝiaj adeptoj eĉ ne bezonus specialajn bondezirojn. Prof. Biallas finis per citaĵo de Johann Gottfried Herder: "Tiu ĉi estas unu el ni; tiu estas fremdulo" - tiel parolas malgrandanimuloj. La mondo estas nur unu unueca domo. Kiu rigardas la aferon de la homa gento kiel la sian, tiu partoprenas en la laboro de la dioj, tiu partoprenas en la Pato."

D-ro Rommel, ministeria konsilisto en la Federacia Ministerio pri Scienco kaj Klerigo, transdonis la salutojn de sia ministro, Helmut Rohde, la protektanto de la 59a UK. Li diris interalie: "Hodiaŭ vi kolektiĝis la 59an fojon, el multaj landoj de la mondo, por interŝanĝi opiniojn kiel akceli kaj evoluigi internacie uzatan lingvon. Esperanto jam tra kelkaj jardekoj pruvis, akompanate de multaj malhelpoj, ke homo super landoj kaj malsamaj sociaj sistemoj povas paroli kaj interkompreniĝi unu kun la alia. Kun la kreo de Esperanto estis ligitaj grandaj esperoj, nome pri la antaŭenigo de internacia kompreniĝo, kultura kaj politika interŝanĝo. Ni hodiaŭ iĝis realismaj ni scias, ke la fundamenton por progreso necesas krei per etaj paŝoj. En tiu senco via klopodo por la plua evoluo de Esperanto kiel vivanta fremda lingvo devus esti pli bone rekonata kaj agnoskata."

Oficialaj reprezentantoj el 18 landoj salutis la kongreson, inter ili estis diplomatoj el Aŭstralio, (nome de la ambasadoro en Bonn, Ralph Harry), Aŭstrio, (kun memorigo pri la mortinta prezidento Jonas), Belgio, Bolivio, Britio (la unuan fojon reprezentita en UK), Bulgario (invito al UK en Varna 1977), Finnlando, Hispanio, Israelo, Japanio, Nederlando, Pollando, Sudafriko (?), Svislando, Usono kaj Suda Vjetnamo (la ambasadoro). Akcentinde estas, ke la reprezentanto de la Ministerio pri Eksterlandaj aferoj de Israelo kaj la Ĝenerala Konsulo de Usono salutis esperantlingve. Sep pliaj registaroj sendis skribajn salutojn.

Bondezirojn adresis, same en Esperanto, s-ro Ernle Money, brita opozicia ministro pri kulturo kaj estro de la Grupo por Esperanto en la Brita Parlamento, d-ro Menabene (nome de la Socialista Internacio kaj Itala Socialdemokrata Partio), s-ro Berggreen por la Skolta Monda Oficejo kaj Prof. V. Peevski, kiu parolis en la nomo de Tutmonda Federacio de Sciencistoj.

Telegramo venis i.a. de la frakcio de CDU/CSU en la Federacia Parlamento kaj de la Konstanta Reprezentanto de GDR en Bonn.

Pro tempore, la delegitoj de landaj Esperanto-organizaĵoj el 35 landoj nur povis esti prezentitaj al la kongresanoj. Por la Infana Kongreseto salutis du reprezentantetoj.

La Solona Inaĝuro finiĝis per la Festparolado de la Prezidanto de UEA, prof. Ivo Lapenna. Post superrigardo pri la historio de la Universala Kongresoj, omaĝo al la kongresa lando kaj prituŝo de la kongresa ĉeftemo "Naciismo kaj Internacia Kunlaboro en la Nuntempa Mondo" prof. Lapenna deklaris, ke li retiriĝos dum tiu ĉi kongreso el ĉiuj siaj funkcioj.

Li diris i.a.: "Nun, estimata prezidantaro kaj estimataj geamikoj, mi deziras anonci al vi, ke mi decidis ekŝiĝi el ĉiuj funkcioj en Universala Esperanto-Asocio. Farinte tiun decidon, mi prenas la kuraĝon diri al vi kelkajn adiaŭajn vortojn. Dum dudek kvin jaroj ni konstruadis - ni, nome tiuj, kiuj efektive kunlaboris; kiuj fidis je la neŭtraleco de UEA, kiuj komprenis, ke la neŭtraleco de UEA estas bazo de ĝia universaleco - ni konstruadis la modernan, fortikan kaj prestiĝan UEA, surbaze de principoj, prilaboritaj jam en la jaroj 1948, 1949 kaj 1950. Agante laŭ tiuj principoj, ni malfermis multajn pordojn, ni traboris multajn murojn kaj vastigis la eblecojn por la uzado de la Internacia Lingvo. Universala Esperanto-Asocio duobligis sian membraron; ĝi kreis la gravan Centron de Esploro kaj Dokumentado (1952), kaj dank' al tiu Centro, kiu povis nutri la neŭtralan Esperanto-movadon kaj la ĝeneralan Esperanto-movadon per gravaj dokumentoj kaj bonaj argumentoj, ni sukcesis progresigi Esperanton konsiderinde en la lastaj dudek jaroj...." (Laŭ gazetara servo de UK)

#### Kongresaj notoj margenaj

La Senato de la Libera kaj Hansa Urbo Hamburg invitis kelkcenton da kongresanoj al akcepto en la urbodomo, la 29an de julio, je la 17a horo, Salutis la gastojn per simpatiaj kaj kuraĝigaj vortoj la senatano por lernejoj, Seeler. Por la neĉeestanta UEA-prezidanto dankis vicprezidanto, prof. Popoviĉ.

La vendreda gazetara konferenco estis plena sukcesa. Ĉeestis pli ol 30 ĵurnalistoj, radio- kaj televidstacioj. Ankaŭ dum la daŭro de la kongreso ĉeestas ĵurnalistoj. Deutsche Welle (Germana Ondo) kaj Deutschlandfunk faris multajn radio-intervjuojn. La Televido elsendis kelkfoje informojn pri la kongreso, ĉiuj germanaj radiostacioj dissendis, eĉ kelkfoje, diversmanierajn raportojn kaj felietonojn, informojn. La tuta gazetaro de FRG detale raportis pri la kongreso, parte sub la kultura rubriko, kompreneble ne ĉiam tute pozitiva por Esperanto. Speciale unu ĵurnalistoj, kies manuskripto aperis en multaj gazetoj, esprimis dubon pri la ŝancoj de Esperanto. Estas lia rajto dubi, estas la tasko de la esperantistoj venkigi Esperanton.

Pola Radio estas reprezentata fare de la jam konata dum la UK redaktoro Andrzej Pettyn, kiu per kablo kaj telefono transdonas aktualajn raportojn kaj sonscenojn. Varsovio en Hamburgo estas bone aŭdebla, speciale la vespera kaj matena programo. Mi povis aŭskulti al la raporto pri la inaĝuro, al intervjuo kun LKK-prezidanto d-ro Bormann kaj al intervjuo kun Emilja Lapenna pri la rezultoj de la Belarta Konkurso.

En la kongresejo troviĝas librostando el Nürnberg bone provizita. Ĝis mardo, la 30 jul, la kongresanoj aĉetis librojn en valoro de 10.500, --GM. Unu el la plej multe aĉetataj libroj estas la Biblio kaj Nova Testamento, certe surprizo por multaj. Furoraj libroj estas: El la vivo de bervalva netaĝulo, Amuzaj dialogoj, la Forge-serio, krome la vortaroj PIV, Plena gramatiko, kaj la Naŭlingva Ekonomika-Socia Vortaro. Ĝenerale oni povas konstati, ke la publiko preferas bonkvalitajn, enhave kaj aspekte, librojn, eĉ se ili estas multe-

kostaj. La 5 ekzempleroj de la ĵus aperinta "Zamenhofa Galerio", kiu kostas 65,- GM, rapide elvendiĝis.

Diskoj ĝenerale ne plu estas tre ŝatataj. Kiel novaĵo oni trovas la diskon kun deklamaĵoj de Nikolaj Rytjkov. Ankaŭ esperantistoj nun preferas kaseton. La 44 kasetoj kun konversacioj de diversaj esperantistoj, faritaj de s-ro Deers, jam forvendiĝis.

La kongreson ĉeestas reprezentanto de la pola aertrafiklinio LOT. LOT eldonis jam kelkfoje informilojn en Esperanto. Dum la kongreso estas senpage haveblaj ilustritaj poŝtkartoj kun Esperanto-teksto, kiun la kongresanoj volonte uzas. Same haveblas LOT-vortareto en diversaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto.

FIAT disponigis al la kongresanoj novajn prospektojn pri siaj aŭtomobiloj kaj belaspektan aŭtomobilan vortareton en kelkaj lingvoj kaj kompreneble ankaŭ en Esperanto.

Krom la oficiala teatraĵo okazis libervola teatra prezentado marde la 30 jul 1974 je la 20a horo de la Pola Esperanto-Teatro "Antoni Grabowski". Kalina Pieńkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynski prezentis la komedion "Proksima Nekonato" de Aleksander Scibor-Rylski en la traduko de Jerzy Grum.

Novaj libroj venis el Japanio, i.a. represo de Literatura Mondo. Du novaj volumoj videbliĝas sur la librostando de STAPETO, inter ili noveldono de PROVERBARO ESPERANTA de Zamenhof.

En la intervjuo kun A. Pettyn Emilija Lapenna diris, ke esperantistoj ĝenerale ne estas literaturemaj. Laŭ niaj spertoj tiu konstato ne estas ĝusta. Kiel pruvas la vendado dum la UK, la esperantistoj ja aĉetas literaturon kaj altkvalitajn librojn. Nia libromarkato malsanas je du faktoroj: la relative malgranda nombro da homoj, kiuj vere regas Esperanton tiomgrade, ke ili kun ĝuo kaj sen multe da ĝeno per vortaro vere povas legi librojn kaj la reto de distribuado. La esperantistoj nur malofte havas okazon por rigardi librojn antaŭ ol mendi kaj aĉeti. Naciajn librojn oni aĉetas en librovendejoj, sed pro la vasta disigiteco geografia de eventualaj klientoj tiu sistemo ne funkcias.

\*\*\*\*\*

### Rekomendindaj libroj

Kongresanoj havas okazon aĉeti en la kongresa librostando jenajn librojn:

Retoriko de Ivo Lapenna	21,- DM	
Elektitaj paroladoj kaj prelego de Ivo Lapenna		12,-- DM
Bona ŝanco de Werner Bormann		14,40 DM
Nuda inter lupoj de Bruno Apitz		
La unua beletra libro el GDR		12,-- DM
Poŝatlaso en Esperanto		5,90 DM
Ne plu ludo kaj aliaj noveloj de N. Bartelmes		6,40 DM
Infanoj de la malriĉuloj, romano de John A. Lee		10,50 DM
Sageoj kaj rakontoj laŭlonge de la rejno (memoraĵo pri la kongreslando!)		2,85 DM

kaj multaj aliaj!

Antenton! Nova stoko de INTERNACIA KOMERCA+EKONOMIKA

Jus alvenis! VORTARO en NAŬ LINGVOJ 65,-- DM

Ĉiujn librojn oni povas kompreneble mendi ĉe Ludwig Pickel,  
85 Nürnberg 1, Postfach 2113!

## Radio Bervalio respondas:

Demando: Ĉu esperantistoj povas transsalti la Berlinan muron?

Respondo: Ili povas, kondiĉe, ke ili tion faras - per flugiloj de facila vento!

\*\*\*\*\*

## Tria kongreso de Kristanaj Esperantistoj

Hamburgo (pp) Sub la temo "Li la Majstro - ni la fratojn" okazis de la 20 - 27 julio 1974 en Jugendpark Hamburg-Langenhorn la Tria Kongreso de Kristanaj Esperantistoj (35a IKUE-kongreso; 26a KELI-kongreso).

La kongreso akceptis jenan rezolucion:

"Ni, la membroj de la tria internacia Kongreso de Kristanaj Esperantistoj, kunvenante en Hamburgo, estante anoj de pluraj eklezioj, kaj katolikaj kaj protestantaj, el 17 landoj inter Finnlando kaj Madagaskaro, rimarkas, ke la estraro de la Kristana Konferenco de Azio estas malfeliĉa pri la decido de la Mond-konsilantaro de Eklezioj nomi nur Eŭropajn lingvojn kiel oficialajn laborlingvojn por la Asembleo en Jakarta. Ni volas atentigi la Mond-konsilantaron pri la avantaĝoj de la Internacia Lingvo Esperanto. Tiu ĉi kongreso, uzante Esperanton, havis nek lingvajn problemojn nek elspezojn de tradukado"

## Ekumena Diservo

La dimanĉan ekumenan diservon kadre de la 59a Universala Esperanto-Kongreso en la preĝejo "Gnadenkirche St. Paul" ĉeestis 600 personoj. La diservajn ceremoniojn plenumis 10 pastroj el FRG, Italio, Pollando, Aŭstrio (4 protestantaj, 6 katolikaj). Sekvis eŭkaristio kun celebrado de 6 sacerdotoj. Sub direktado de pastoro Burkhardt (KELI-prezidanto) kantis internacia ĥoro, fondita dum la ĵus finiĝinta Tria Kongreso de kristanaj esperantistoj, ĥore kaj gregoriane.

En "Deutsches Pfarrer Blatt", eldono dua jul 1974, sur paĝo 479 aperis artikolo de Rudolf Horský en la traduko de Adolf Burkhardt kun la titolo "Zur Geschichte der Plansprache" (Pri historio de planlingvo) kun subtitolo "Sur la spuroj de Jan Amos Comenius".

## Lastaj informoj el Kronach

Kronach (pp) Kronach atendas la postkongresanojn. Komputero preparis ĉiuj teknikajn detalojn. El ili ni ekscias, ke aliĝis 117 personoj el 19 landoj, inter ili 59 sinjorinoj kaj 58 sinjoroj. Entute la turistoficejo mendis ĝis nun 680 tranoktadojn, 66 personoj veturos komune per vagonaro al Kronach de Hamburgo, oni mendis 85 tagmanĝojn por la komuna manĝado, dimanĉe la 4an de aŭgusto, 80 personoj partoprenos la ekskurson al Coburg, 70 al Bamberg, 77 al Frankonia Arbaro. Dimanĉe, la 4 aŭg, je la 11a horo, urbestro de Kronach, Baptist Hempfling salutas la kongresanojn en la Urbodoma Salonego. Cetere la programo antaŭvidas ripozon kaj turismajn allogaĵojn!

La komputero "parolis" ankaŭ en Esperanto!

## 30a IJK Münster

Por interesuloj haveblas la konferenca libreto pri la 30a IJK de la 3a ĝis 10a de aŭgusto 1974, prezo 2,- DM. D-rino Katharina Focke, federacia ministro pri junularo, familio kaj saneco, dediĉis al la konferenco salutvorton. Ni citas el tiu saluto jenan rimarkinda frazon: "Sendube Esperanto Esperanto havas gravan funkcion en la internacia junulara kaj kultura interŝanĝo, kiun la federacia registaro rigardas kiel signifan eron de sia porpaca politiko."